



HORIZONTO

Jurbarko esperantininkų informacinis leidinys

NUMERO 1(20) (I-A KVARONO) 2017

SALUTOJ, BONDEZIROJ

Intertempe 01.01-03.31 klubanoj festis naskiĝtagojn: **Estimataj Arūnas Vaivada (01.08), Laimundas Abromas (01.10), Kazimiera Petraitiėnė (01.10), Stanislovas Raulynaitis (01.26)**



Ni ĉiujn gratulas kaj deziras al Vi sanon, sukceson kaj ĝojon!

Geklubanoj de Esperanto klubo

Tago de Valentino



Sinceraj gratuloj kun tago de Valento
Prezidanto de la Esperanto klubo Horizonto

Feliĉan la 8-an de Marto!



Karaj virinoj de la klubo Horizonto kaj ĉiuj virinoj esperantistinoj en la mondo. Okaze de internacia virina festo amike mi deziras al vi agrablan kaj neforgeseblan festotagon!

Prezidanto de la Esperanto klubo
Horizonto Stanislovas Raulynaitis

INFORMOJ

La **27-an** de januaro okazis raporta-elekta kluba kunveno, de la Jurbarka Esperanto klubo Horizonto. Partoprenis 8 anoj de la Jurbarka Esperanto klubo Horizonto. Prezidanto Stanislovas Raulynaitis informis pri atingojn de la klubo dume 2016 j. Li dankis klubanojn pro la aktiva laboro en Esperanto movado kaj enmanigis dankfoliojn al la plej aktivaj esperantistoj. Revizia komisiono informis pri la klubaj financoj. Antaŭtempe hejme en elektado de la kluba estraro partoprenis du esperantistinoj Aldona Žiženė kaj Kazimiera Petraitiėnė. Ili pro la hanora aĝo jam ne vizitas klubon.

Ni pridiskutis planon de agado por la 2017 j. Estis pridiskutita pri eldonado de Esperanto revueto Horizonto. Esperantisto Arūnas Vaivada rakontis siajn impresojn el ekskurso en Ukrainio.

Irena Viliuŝienė



Esperantistinoj el dekstre Zofija Babonienė kaj Irena Viliušienė



Diskuto inter Laimundas Abromas kaj Arūnas Vaivada(dekstre).



Sur la foto el dekstre: Zofija Babonienė, Irena Viliušienė, Laimutė Ašmonaitienė kaj Regina Petraitytė

Informilon preparas redakcia komisiono.

Ni vizitas siajn klubanojn Ĉe Rimantas Endriulaitis

En la komenco de februaro mi vizitis hejme ĉe Rimantas Endriulaitis. Lastmomente li pro la sanaj problemoj ne povis viziti klubajn kunvenojn.

Hejme li estas okupita, ne sidas sen laboro. Ligas paperan varianton revueto Horiozonto. Ankaŭ nun li produktas E-ingnoj por la monda Esperanto kongreso kaj kaj por la BET, kiu okazos en Latvio. En BET li promesas partopreni. Li estas ekzemplo pro la sia aktiveco.

Forpasis Aldona Žižienė



La 20-an de februaro forpasis la litova esperantisto s-ro Aldona Žižienė (Ĵiĵiene) naskiĝis la 15-an de oktobro 1930 en vilaĝo Martinaičiai, distrikto Radviliškis. Ŝiaj gepatroj Feliksas kaj Stanislava Nefai estis terkultivistoj, ili posedis 12 ha agrokam-pon. Aldona finis mezlernejon en Grinkiškis, Kooperadan teknikumon en Kaunas kaj en 1951 akiris specialecon de ekonomistino. Ŝi laboris en Unuiĝo de kooperativoj de Kuršėnai, ekde 1956 en distrikta unuiĝo de kooperativoj de Jurbarkas, ŝi estis ĉefekonomistino. Ekde 15 de oktobro 1985 Aldona estas pensiulino. Pri Esperanto Aldona eksciis en 1972 el distrikta gazeto „Šviesa“. Ŝi aliĝis al la kurso de Esperanto, kiun gvidis A.Mekys (prezidanto de Esperanto klubo ĉe Vilnusa Instruista domo) de 4-a ĝis 9-a de januaro

1972 en distrikta biblioteko de Jurbarkas. Poste en oktobro 1972 Esperanto rondeto de Jurbarkas organizis lingvokurson en distrikta biblioteko, kiun gvidis instruistino D.Kutkevičienė. Aldona aliĝis al tiu kurso, finstudis ĝin kaj 17-an de majo 1973 sukcese trapasis ekzamenon. En ekzamena komisiono estis D.Kutkevičienė, K.Jomantas kaj B.Jurkevičiūtė. Ekde julio de 1978 Aldona partoprenis kune kun P.Didoras, S.Raulynaitis kaj L.Abromas en la restarigo de Esperanto movado en Jurbarkas. Ŝi iĝis kasistino de la klubo. Tiun ĉi postenon Aldona Žižienė okupas ĝis 2015. En daŭro de 36 jaroj Aldona akurate ordigis finansajn aferojn de Esperanto klubo „Horizonto“, aktive partoprenis en kluba laboro. Ŝi partoprenis en ĉiuj Esperanto – tendaroj en Vytėnai, kiujn organizis klubo „Horizonto“, en BET-23 en Smalininkai 1986 ŝi gvidis ekskurson tra distrikto Jurbarkas, partoprenis en kelkaj aliurbaj esperantistaj aranĝoj. Aldona vaste korespondis kun alilandaj esperantistoj, multe legis kaj abonis E- periodaĵojn. El ŝiaj proksimuloj neniu scipovas Esperanton. Aldona tre amis florojn, en ŝia loĝejo abundis multe da diversaj floroj.

Kastelo de Panemunė

Ni invitas vin viziti la kastelon de Panemunė kaj apudan parkon. Vojaĝante de Kaunas al Jurbarkas 73 km laŭborde de rivero Nemunas en bela natursino vi ekvidos kastelon de Panemunė. En 1597 j. ĉiloke situantan bienon de Panemunė, aparteninta al bienulo St. Stankevičius – Bielevičius, aĉetis hungardevena nobelo Januŝ Eperjeŝ. En 1604 j. li komencis en tiu ĉi loko konstrui por sia familio renesansan brikan kastelon. 158 jarojn la kastelon regadis familio Eperjeŝ (Eperjesz, Eperias, Eperies) ĝis kiam en 1753 ĝi estis vendita. En daŭro de 400 jaroj sanĝiĝis la mastroj de kastelo, sanĝiĝis ankaŭ la titoloj. La plej malnova ĝia nomo estis kastelo de Panemunė, sed ĝi ankaŭ nomiĝis kastelo de Gelgaidai, Zamkus (ruse za- mok - kastelo), Vytėnai, eble eĉ alimaniere. Unu el la plej lastaj mastroj de tiu ĉi kastelo estis Antanas Gelgaidas mastro de Akmenė kaj standardisto de Litovia Granda Duklando. Li kastelon rekonstruis, ordigis parkon kaj aranĝis ŝikan rezidejon al sia familio. Ekde 1783 ĝis 1795 A.Gelgaidas okupis altan postenon de sindiko de Ĵemajtio (okcidenta parto de Litovio). En 1795 li

forpasis kaj kastelon heredis lia filo Mykolas Gelgaidas kaj lia edzino Eleonora, filino de grafoj St. kaj I. Tiškevičiai. La novaj mastroj ne sukcesis mastrumi la hereditajn riĉaĵojn, tial en 1828 la heredaĵo estis disdonita al kreditoroj kaj al la familio M. Gelgaidas, kiu havis du filojn- Antanas kaj Jonas. Ambaŭ filoj estis aktivaj partoprenantoj de la ribelo de 1831 kontraŭ rusa caro. Antanas Gelgaidas – la generalo de Pola Armeo iĝis la plej ĉefa estro de ribelo en Litovio. Post la malvenko de ribelo la armeo de Gelgaidas devis retiriĝi. Dum retiriĝo apud Klaipėda li pereis. Generalo A.Gelgaidas estas entombigita en tombejo Kisinai. Dum la bataloj kontraŭ cara armeo la kastelo estis prirabita kaj difektita. En 1832 kastelon ekposedis dis cara administracio kiu tute ne glectis ĝin kaj ĝi po iomete detruigis. En 1867 kastelon kaj bienon de cara administracio transprenis la heredinto de la riĉaĵo, bienulo St.Puslovski. En 1925 la bienon kaj kastelon naciigis Litova ŝtato. En 1934 ruiniĝantan kastelon transprenis Kultura departemento de Kleriga ministerio. Ekde tiu ĉi tempo kastelo estis en dispono de kulturaj kaj klerigaj instancoj. Nuntempe la kastelon Panemunė administras Arta Akademio de Vilnius.

Tra la tegmentofenestroj de sud-okcidenta turo malfermiĝas mirindaj vidindaĵoj: apude la kastelon ĉir-kaŭas kvin digoj, sude – rivero Nemunas, trans la rivero -urbeto Gelgaidiškis, oriente-kastelmonto Kartupėnai. La parkon ĉe kastelo oni aranĝis post la fino de kastelkonstruado. Tamen estas donitaĵoj, ke en Panemunė – bieno 1597 jam estis ĝardenoj, kvar digoj kaj apud ili estis muelejoj. A.Gelgaidas zorgis pri la parko, aranĝis ripozejon, altanojn, oranĝerion kaj padojn al parko. Hodiaŭ la kastelon ĉirkaŭas 15 ha parko, en ĝi estas 5 digoj. La sistemo de la digoj estas aranĝita digante rivereton, kiu komenciĝas el fontoj ĉe la plej supra digo. En la parko kreskas indiĝenaj arboj, ĉefe kverkoj, pinoj, aceroj kaj aliaj. La plej aĝa el ili estas 1,7m diametra kverko situanta en la mezo de suda deklivo, proksime al sud-okcidenta turo. Vizitindaj estas menciita kverko de Gelgaidas, ripozmontetoj, enteriga kapelo. Ekde 1958 parkon protektas la ŝtato. En 1986 al la parko de Panemunė- kastelo estis atribuita statuso de naturmonumento de respublika signifo.

L.Abromas

Informilon preparas redakcia komisiono.

Vytėnai, Vytėnai

Lagetoj spegulaj
Antikvon mencias,
Montetoj subsinkintaj.
Preter arbopintoj
Elstaras kastela palaco
Ekdronita profunde en revoj.
(Laŭ Angelė Andriukaitienė)

Kaj kia belega ĉi tiu regiono, kiu daŭras laŭ rivero Nemunas! Ĉi-tie tuta montĉeno. Sur kelkaj montoj staras eĉ kelkaj kasteloj el de antikvaj epokoj kaj aliaj antikvaj monumentoj.

Jen, el ili estas unu unika loko sub nomo Vytėnai. Ĉi-tie elstaras renesansa rezideja kastelo Panemunė, kiu apartenas al belarto akademio de Vilnius de 1982 jaro. Kastelo staras sur alta bordo de rivero Nemunas kaj ĝi estas monumento de arkitekturo.



Vilago Vytėnai(15 km de Jurbarkas)



Kastelo Panemunė kun kaskadaj lagetoj

En kastelo okazas diversaj aranĝoj, koncertoj, ekspozicioj kaj t.plu. Ĉi-tie ofte alvenas diversaj ekskursoj el diversaj landoj.

Fotoj sube:



Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

Apud kastelo situas antikva parko kun kvin kaskadaj lagoj. Ankaŭ en parko en unu monteto staras malgranda kapeleto. Fotoj sube:

En parko staras tre maljuna kverko sub nomo Gelgaudu. Kompreneble, tio ne tiu kverko, kiu sur foto, ĉar en parko kreskas multe da diversarboj kaj ankaŭ kverkoj.



Hodiaŭa kapeleto



Skribita sur kapeleto

Ankaŭ, en regiono Vytenai staras monaĥejo de antikva epoko Fotoj subite:



Kapeleto aspektis pli antaŭe



Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Sube foto: kiel monahejo aspektis pli antaŭe, kiam ĉi-tiuj konstruaĵoj apartenis al bieno, kiu egzistis eĉ ĝis 1938 j.



En kastelo funkcias restoracio kaj hotelo. Ĉi- tien gastas diversaj gastoj, famaj homoj...



Tiu foto kaj aliaj el restoracio kaj hotelo



Informilon preparas redakcia komisiono.

Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Ĉi -tie loĝas tre sinceraj, bonaj, laboremaj kaj gastemaj homoj. Ili ĉiam atendas diversajn gastojn kaj ilijn ĉiam akceptas sincere kaj gasteme.

Zofija Baboniené

Informilon preparas redakcia komisiono.

Vorto de redaktoro.

Nomo de vilaĝo Vytėnai estis dume soveta periodo. Nun oni nomas vilaĝo Pilis.

NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO "ESPERANTO"



Unuafoje en la historio de la revuo Esperanto, ĝi oficiale havos du redaktorojn, la geedzan paron **Dima Ŝevĉenko (31)** kaj **Anna Striganova (29)**. Tiel decidis la Estraro de UEA, kiu intervjuis ankaŭ du aliajn bonajn kandidatojn por sekvi Attila Kaszás en tiu grava posteno. Ni estis tre impresitaj de la propono, per kiu Dima kaj Anna kandidatiĝis, komentas la prezidanto de UEA, Mark Fettes. Ili kune disponas pri granda gamo de kapabloj, ne nur pri la enhava redaktado, sed ankaŭ pri grafiko kaj enpaĝigo kaj pri la reteja flanko de la revuo. Tiu kombino de fortoj ŝajnas al ni tre promesplena. Ambaŭ homoj laboras partatempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo kaj jam preparas doktorajn disertaciojn por defendo. Ĉe Dima, denaska esperantisto, la diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto kaj ĝia loko en la mondo de amaskomunikiloj. Interreto grave rolas en ilia nuntempa laboro, ĉu en praktika laboro pri la retejo de la Filologia Fakultato, ĉu kiel instrutemo kaj esplorobjekto. Kvinjara laboro ĉe la rethotela kompanio "masterhost" donis al Dima multajn teknikajn konojn sur tiu kampo.

En Esperanto, ili estas konataj kiel la gvidantoj de la grava eldonejo Impeto, kiun fondis en

1992 la gepatroj de Dima, Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko (kune kun Dimitrij Perevalov). De tiu tempo la eldonejo aperigis pli ol 300 librojn en Esperanto kaj la rusa lingvo. Post la forpaso de la fondintoj (Aleksandr en 2012, Elena en 2015), Dima kaj Anna sukcese pluportas la torĉon. Per tiu okupo ili lernis multe pri tekstoredaktado kaj enpaĝigo, same kiel pri la intereso kaj preferoj de la Esperanta libromarkato. (*Retejo de ilia eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com>*). Ili estas aktivaj en la moskva Esperanto-movado, kie ili organizis plurajn popularajn aranĝojn. Ili kunlaboras ankaŭ pri instruado de Esperanto en diversaj medioj.

Anna kaj Dima transprenos la revuon ekde la aprila numero 2017. Kune kun la preparado de sia unua numero, ili planas krei **modernan retejon de la revuo**, kiu celos interagi kun la abonantoj kaj aŭtoroj, kiel ili proponis en sia kandidatiĝa letero. Tia integriĝo de la tradiciaj paperaj eldonaĵoj en la interretan mondon estas por ili aparte interesa, teorie kaj praktike.

Laŭ gazetara komuniko de CO de UEA

Humoraĵo „Ĉesu „

Mia amiko Paŭlo trovis en poŝtkesto leteron, en kiu estis pentrita kranio kaj skribita ununura vorto „ĉesu „. Paŭlo komprenis „kion signifas kranio „, sed neniel povis percepti signifon de la vorto. „Mi estas nek juĝisto, nek konsilisto, - ĝemis li. - Mi estas simpla , plej trankvila homo , eĉ kulon mi ne tuŝis ...“ . Kaj vere , kiam sur nazon lian eksidis iu „besto“ , mia amiko nur ekblovis kaj tuj en animo iĝis serene. „Verŝajne iu ekŝercis , - decidis Paŭlo kaj ne plu pensis pri tio , trankvile laboris en oficejo kaj nokte dormis senŝonĝe. Tamen sekvmatene li trovis ĝuste tian saman leteron. „Kion mi ĉesu? – pensis Paŭlo . – Ĉar mi faras nenion .“ Maltrankviliĝo ne forlasis lin dum tuta tago. Per ĉiuj fortoj li skuis sian memoron – de tie falis titoloj , kostoj kaj televizia reklamo , - tamen trovis nenion seriozan . „Kiu kaj pro kio minacas al mi ?“ - miris Paŭlo. Nokte li dormis malbone kaj matene , malfermante poŝtkeston , tremis liaj manoj. En leterkesto kuŝis tia sama letero , nur literoj tiuĉifoje estis ruĝaj kaj kranio – pli granda. „Necesas turni sin al polickomisarejo“ , - decidis mia amiko. Tamen kiam aliris li polickomisarejon , lia kuraĝo forvaporigis. „Kion mi diros al ili? Se mi estus senviva - afero alia , kaj nun ... Oni eĉ povas min bati per gumita bastono...“ . Returniĝis li kaj piediris al laborejo ĉirkaŭvoje. Laboro tiutage al li ne sukcesis. „Se mi scius kion, certe mi ĉesus, - suferis li . – Ĉar mi estas nek patrioto , nek idioto. Vi nur diru al mi - kion , kaj mi tuj...sed kiel mi ĉesu nun? Informilon preparas redakcia komisiono.

Ne, sinjoroj, tiel estos nenio .“ Vespere perdiĝis lia apetito , komenciĝis tintego en oreloj kaj nokte entute li ne fermis okulojn. Sed matene – kiom da ĝojo :- la poŝtkesto estis malplena. Malhela aŭtuna tago sereniĝis per ĉielarko, en laborejo ŝajne sonis sonoriloj, ree aperis apetito kaj vespere li kun plezuro eksidis ĉe la tablon. Ĝuste tiam eksonis telefono.

- --Ni je avertis vin, - diris tute agrabla voĉo. –Ĉu jes ? Al mia amiko sekiĝis gorĝo.

- Kiu parolas? - ekkriis li.

- Ĉesu, - diris basvoĉo.

- Mi tuj ... bonvolu..., - ekdiris Paŭlo, - Tamen kion mi ĉesu? -

Ĉesu esperantumi, - respondis oni.

- Jen ..., - ekis Paŭlo timigita, - tamen en alia flanko la aŭskultilo estis metita. Mia amiko elŝaltis te- levidilon, estingis lumon kaj enlitiĝis. Li sin turnadis kaj suspiradis , sed pensis nenion .Anstataŭ pen- soj en lia kapo nestis iaj absurdaj vezikoj .Nur antaŭmatene li ekdormis kaj ellitiĝis malplifrupe ol kutime. Rapide glutis iom da kiselu, mordis iom da kolbaso kaj tiam eksonis telefono. – Ĉesu, - diris tiu sama basvoĉo, nur ĉifoje per metala resonu. Trans la fenestro hejtis suno, surstrate ĉirpis paseroj kaj Paŭlo sentis sin pli kuraĝa ol hieraŭ. -

Kion signifas tio? - demandis Paŭlo. – Ĉu mi ne rajtas legi, skribi ? Ĉu mi ne rajtas komputili, renkon- tiĝi kun samideanoj ? – kaj iel strange ekridetis.

- Ĝuste tiel , - respondis baso kaj klarigis al iu ŝajne staranta apude. – Mi diris , ke li komprenas ĉion, tamen speciale ...

- Sed kio okazos , se mi ne ĉesos esperantumi? – rediris Paŭlo.

- Demandu Narbutas-n , - responde sonis en telefono. _ Kiun Narbutas-n ! .- ekkriis Paŭlo, tamen transe jam aŭdiĝis interrompa sono.

„Mi konis nur unu Narbutas , sed tiu antaŭ tri monatoj ... – cerbumis Paŭlo... Subite lin surverŝis ŝvito . „Ja ... Narbutas ankaŭ estis esperantisto ... - decidis Paŭlo.- Jes, Narbutas mortis iel strange.“

Nun Paŭlo ne dubis , necesas informi policon . Li montris al polickomisaro tri leterojn kaj rakontis tutan historion. Komisaro sulkis frunton, poste demandis , kie kaj kion li laboras. – Eble

anstataŭ labori , vi esperantumas ?- ekinteresiĝis komisaro. –

Ne ! -respondis Paŭlo. – Fine afero estas persone mia. Mi esperantumas dum libera tempo. –

Tutegale vi pripensu, - proponis komisaro.-Kiu profitus de tio, se vi ĉesos esperantumi? -

Neniu , - respondis Paŭlo , - Edzinon mi ne havas. –Tiam iru hejmen kaj timu nenion.

Paŭlo ekrigardis trans fenestron. Proksimiĝis krepusko . Komisararo redonis al Paŭlo leterojn kaj diris havanta pli gravajn aferojn. – Tamen Narbutas-n ili mortigis , - diris Paŭlo. - Kvankam pacienca homo estis , malnova esperantisto. Pensiulo. Li sidis ĉe la tablo , skribis kaj ne atendite ... Koro – tiel diris kuracistoj . Tamen kredi ilin oni ne povas. – Pensiuloj ĉiam tiel , - rediris komisararo kaj rekomendis al Paŭlo iri hejmen. – Mi nenien iros !- ekkriis Paŭlo. - Vi arestu min aŭ donu gardiston!. Tiam komisararo malfermis pordon kaj forpelis Paŭlon surstraten. Reveninte hejmen Paŭlo trinkis du litrojn da akvo kaj enlitiĝis. Matene post matenmanĝo Paŭlo vizitis prezidanton de Esperanto klubo kaj ĉion rakontis. „Mi pensas, ke polico kunagas kun ili“ , - finis Paŭlo . - „Kion mi faru ?“ Klubprezidanto metis manon sur la ŝultron de Paŭlo kaj konsilis: – Ne ĉesu , - li diris. – Ne indas subiĝi al premado. Se ili ekvidos, ke vi timas, ili impertinentiĝas ĝisfunde. Konsolaj vortoj al Paŭlo ĉimomente ege ne cesis. Li ĉirkaŭbrakis klubprezidanton kaj ekploris. – Ĉu pri tia vivofino ni esperis ? – demandis Paŭlo. – Tutegale kiom aktiva vi estos, kiom forta, ĉu vi sole sukcesos kontraŭstari ? Se niaj samideanoj aktivamase , multnombre ...kaj nun ... - rediris klubestro. – Mi ne kapitulacos !, - montris dentojn Paŭlo . – Jes, inter ni - esperantistoj mankas unueco ... Tamen se ĉiuj el inter ni serioze esperantumu ...- bedaŭris li. Veninte hejmen, Paŭlo ŝirmis fenestron , eksidis ĉe la tablon kaj komencis... Li verkis multe kaj longe , fojfoje ekkantante :“ ...kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj, nek batoj de l sorto, nek moko de l homoj.... „ - po unu , po du strofojn , memoris kiom. Neniu telefonis. Li ripozis bonege, kaj matene ĉiuj strangaj okazintaĵoj ŝajnis al li kiel sonĝo. Li forŝirmis fenestron – surstrate hele lumis suno - kaj eksidis ĉe la tablon por matenmanĝi. Li manĝis multe, ĉar neniu ĝenis. „ Ili vidas , ke mi ne timas ilin – pro tio ĉesis. Ĉar ili mem estas timuloj“ – pensis Paŭlo. Sed kiam venis tempo por iri al oficejo, Paŭlo eksentis, ke tremas liaj manoj kaj koro forte batas. Li ne kuraĝis malfermi pordon : „ eble tie trans la pordo oni jam atendas lin?“ Finfine Paŭlo metis enpoŝen tranĉilon kaj ekpaŝis. Neniu atendis lin, tamen Paŭlo ne dubis , ke ĉio finiĝos ĝuste hodiaŭ... Li estis jam apud la oficejo kiam surveturis lin ŝarĝaŭto. Kaj neniu eksciis, ĉu tio estis malfeliĉa okazintaĵo , aŭ intenca hommurdo. Kiam mi rakontis tiun historion al la klubanoj , tiuj Informilon preparas redakcia komisiono.

nur rediris : „ La vivo de esperantistoj estas danĝera...“.

A.Mikas

Redaktoro: Stanislovas Raulynaitis
Korektadon okazigis L.Abromas
Kontaktoj: klubas.horizontas@gmail.com
Tel. Nr. 8-620 21024